GISTO, JUL, 2005.
GOVaske- ottovaske@ibest.com.br
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Skribo ttt-kongrua.
Pro malsanigxo forfalis la junia GISTO.
Karaj geZaghettoj, gxis nun ne vidis la anoncitan“surogaton”.

KONSIDEROJ pri la 40ª BKE

Gxi restas dumvive neforvisxebla evento de Esperantio, malgrau la acha vetero en la jxaudo, kun kontinua pluvo je malalta temperaturo, malsaniga vetero ne nur por olduloj. Tamen nordanoj kaj nortorientanoj brazilaj spite frontis la achan veteron per malkasxa torako kvazau primokante la gaucharon. Nu, ja ne nin, okdekjarulojn kiuj ekvilibras sian sanstaton pro entuziasmo pri nia nobla idealo kaj kontagxa amikeco inter foraj geamikoj, ofte nur per radio konataj. Tia estas la kazo de la radiokolego Mauricjo, el la chefurbo Fortaleza-CE. Li venis kun siaj gefamilianoj kuragxe fronti la gauchan meteologian sxangxigxemon.Same mia elstara cearaa-bahiano sinjoro Hajlo kaj edzino radioamatora. Ni delonge konatigxis pere de EKOLINk (Echolink).Lia vocho estis iomete malsama ol tiu konata tra la etero. Oni tre gxojas ke de nun rilatas pli amike,pli intime kaj pli bone mi komprenos liajn vortojn malgrau ke la nordorientanoj, por mi, parolas tro rapide. Ech vizagxo al vizagxe oni devas pintigi la orelojn por ne perdi silabojn...hi...hi – La posxo de Mauricjo bonstatas. Mi suspektas ke li estas altgrada politikisto, chu deputito au chu senatano, tial ke li plensxargxis min per valoraj donacajxoj, en la jxaudo antau ol mi forkuris al la elirejo de la kongresejo kie mia filo atendis por konduki min hejme en sia auto, chirkau 80 Km for, pro la acha vetero. Trovigxis verduloj el Manaus, el Macejo', el RIO kaj el San-Paulo inter multegaj kiujn mi ne kontaktis persone, inter la 400 kongressanoj – Pozitivan eron alkalkulis la Librofoiro far BEL. Eble milaroj da libroj kusxis tie sur longaj tabloj, disponeblaj, kiuj elsorchis Realojn gxis elcherpigxo de niaj posxoj. – Elstara persono, sbelta sinjorino, sukcesis altiri la atenton de aroj da scivolaj homoj. Sxi estas china civitano kies nomon mi bedaurinde ne registris. Memkompreneble chiuj, kiel mi, kredis sxin CHO-RO-I parolistinon, chiutage audebla dum unu tuta horo, 22,00UTC lau 9860 Khc.. Chiuj eraris char shi tre lerte scias uzi la lingvon. Tre simpatia kaj alirebla, sxi provis kontentigi chies scivolemon. Oni chefe demandis sxin pri prezoj de logxejoj. Sxi diris absurdan kvanton da Juanoj(por ni) por unu kvadratmetro. Tuj cheestanto kalkulis: chirkau 1000 realojn. Do, pli multekosta ol nialande (R$ 700?) Sxi kaj la edzo tenas altajn laborpostenojn... en Chinio altaj funciuloj rajtas helpon por akiri sian propran domon. Kune la geezoj posedas pli ol necesajn chambrojn. Mi diris, nu do vi devas piochi, por plenigi chiujn chambrojn per idoj. Tuj sxi respondis, ke du chambrojn ili ludonas. Jen helpa fonto pro kio sxi povis venki la grandan distancon al nia Kongreso, veninta el urbo inter Pekino kaj Sxangaj. Jen do almenau sxi, venis al nia Kongreso. Parolisto/jn de Cho-Ro-I mi plurfoje invitis sed ili kondichigis la alveturon nur se ni konfirmus starigon de klubo el radio-auskultantoj. Al LKK mi sciigis tion. Gxi ne realigxis. La homoj nialandaj preferas tondrajn bruojn al edifaj programoj. Junuloj gxuas ech audante kanonajn pafojn !! Lasu ilin...post la 50ª jaragxo ili pentos, pro surdeco. Mi mem iom suferas tion char mi ofte devis transiri flughavenan korton kie jetoj manovras antau ekflugo kaj post sueterigxo.Postrestis multo dirinda, mankas spaco en chi Gisto.

*Speciala danko far la gekonggresanoj iras al lia Rektora Mosxto, D-ro Solon Santana. – Li, elstara partoprenanto de nia tradicia Verda Kafo, havigis al ni la moderan kongresejon kiu gastigis nin en gxiaj luksaj instalajxoj de F.A.P.A.*

Nun, rememorigo: kie suno brilas, gxi estigas ombron. Kkvankam Gisto ofte memorigis la verdan gaucharon, ke oni ne lasu nur du au tri personojn sursxultrigi la pezegajn kaj lacigajn laborojn, mi havis telefonkontaktojn kun plendoj tiurilate. Mi, malproksime logxanta, rimarkis elstaran diligenton far pokaj, tial laudindaj homoj. En la koro mi tenas iliajn nomojn, sed silentas, por ne forgesi citi la nomojn de aliaj pri kies kontribuo mi ne audis. – Unu el la piochantoj estis konsiderata krucumita. Nu, oni ne troigu. Mia respekto iras al chiuj kune! – Escepte de eretoj, chio bone marsxis sed, por estontaj eventoj, mi riskas mencii jenon: Chambroj en kiuj okazas prelegoj/kursoj ne aparte pagendaj, devus teni la pordon malferma sed, se gxi devas resti ferma, por ke gxena en/elirado ne okazu, devus afisxi sur la pordo sciigon: interesatoj envenu, sen frapi. Mi konstatis ke bonedukitaj homoj staris antau la pordo kaj esperis ke iam iu venos observi, chu pliaj homoj volas eniri. Post kelkaj minutoj ili disfumigxis. – Servo utila estus ebleco, per lautparolilo, averti en kiu chambro en la sekva momento komencigxos nova kunsido. Al mi ekz. okazis la perdo cheesti la instruan paroladon de R.Zaghetto, pri GO-ludo. Okazas tiom da novaj konatigxoj, kiuj foruzas longajn minutojn per vigla interparolado kaj spritaj dirajxoj, kiu tute forgesigas pri antaue celatan prelegon..Same perdigxis renkontigxo kun J.Piton kaj Íris, la junulara prezidantino. – Eble pro tio, ke pokaj “sklavoj” devis porti la “pianon”, ne okazis la kutima Kongresa Kuriero. Domagxo. – Cele enkonduki interesan eron en la Kongresan Rezolucion, mi transdonis al LKK-anoj skizon tiurilate sed ne plu audis pri tiurilata decido.- Nenion oni informis al mi pri la ideo enlasi NE-esperantistojn dum Arta Vespero; same ne pri la propono: DM-loto en grandajn E-eventojn. Nu, arbarulo ne rajtas opinii, subkomprenas mi. Do GEA-ano restas metita en fridujon. Aldone mi informas ke mi estis preparinta ereton, por ensalti, se hazarde mankus responsulo pri difinita duonhora prezento.- En la lunchejo mankis telefonkartoj; “baldau ni disponigis da ili”, la mastro trankviligis sed ne aldiris, en kiu monato char posttagmeze kaj en la sabato ankorau ili mankis. – Nun, pri la Milion-ludo: altgrade interesa konkurso. Rilatas al vetludo lau kiu vetanto povas gajni sed, se li au sxi (sxli?) eraras respondon, ili perdas la tuton gxis tiam enkasigitan krediton. Kvankam oni ne investas vivan monon, la ludo ja estas veto kontrau kompanoj .Mi do preferus la nomon Milionveto. – Mi memorigas ke prof. Cezar instruas: oni uzu la vorton gxuste/gxusta kiam la respondo trafis la celon, ne korekte/korekta.- chimarono cirkuladis chiutage. Chu vi scias kiel bahianoj chikanas gauchojn? Ili diras ke chimarono estas “chá de cisco” = teo el kunbalaitaj surplanken falintaj eroj(!) La gauchoj sprite reciprokas per “bahiano!” al homo kiu mallerte rajdas...hi...hi!

FERMO – La auditorio preskau plenplenigxis. Post paroladoj kaj atestilodisdonadoj la LKK-anoj kaj favorantoj ricevis dankegojn pro ilia zorga laboro; ankau pardonon pro etaj malglatajxoj (pri kiuj kulpas la koboldoj) okazintaj dum la kongresaj tagoj. Unu malglatajxo ja estis la acha mikrofon/lautparolila sistemo. Oni mansignis alten, ke parolantoj parolu pli laute. La sida BEL-prezidanto starigxis. Chu spritajxo lia? – La modulado dauris nekomprenebla por, lau mi, 80% de la audantaro.Che mia flanko samideano dormis. Al mi sxajnis ke la parolantoj estis bone komprenataj nur de la chirkaustarantoj. Oni povis vidi ke plurfoje okazis spritaj dirajxoj char la proksimaj cheestantoj ridis k ridegis. Kie mi situis, meze de la auditorio, neniu kaptis la ridigan diritajxon. Lau mi la difekto kusxis same en la mikrofono kiel en la lautparolilo.Oni audis forte unuan silabon sed tuj poste la frazoj farigxis refkektemaj. – Aldonindas ke la cheestantaro, dum la fermo, eksciis ke la tre atendita E-familio Piton (Kampinas) devis rezigni char ilia hejmo richigxis pro la naskigxo de fratino de ilia unuenaskito Jean. Jen nia bonvenon kun bondeziroj! Kiel en chiuj eventofinoj, antau la adiauo, ripetigxas emociplenaj brakumoj kun arda deziro, ech kun larmoj, revidi la bonajn geamikojn en la venonta jaro kaj baldau chiuj forsxvarmis serche de mangxejo. Estis jam preskau la horo 13.00ª..

Kiel kutime, Gisto provas aldoni iom da bonhumoro. Chu vi legis chisuban en DG?

EN BARBIREJO

Unubrakulo eniras barbirejon, sidigxas sur ties segxo kaj mendas: razi kaj pritondi la hararon. Tuj post eklabori la barbiro iomete entranchas lian vangon, poste en la mentono. Post kelkaj minutoj la kliento suferas iom pli profundan entranchon che la kolo. Chiufoje la barbiro zorgas la vundon per la sangogaltiga lapiso. Daurige sekvis la pritondado.Dum li gxustigas la liphararon, li pikis la nazon. Fine, por iel varmigi la etoson la barbiro riskas diri: Mi pensas ke hodiau estas ne la unua fojo ke vi venis al chi-barbirejo, chu?

- Ne mia kara sed, la brakon mi perdis dum automobila akcidento!

Karaj Gisto-gelegantoj, estu malavaraj, disdividu kun gesamideanoj vian spertatan gxuon kiam vi legis novan anekdoton. Gisto peros vian bonkorecon.

Se Gisto enhavas malglatajxojn, ne kritiku, helpu min! – Frazo edifa: En nia lando oni facile krucumas homojn sed, konstatinte ties senkulpecon, ne deprenas ilin de la kruco.